

KRESKO 1

2017 decembro

KROATA ESPERANTISTA KOLEGARO

ĈE VOJKRUCIĜO

Fine de 2017 ni devas konstati: **ni troviĝas ĉe la neevitebla vojkruciĝo!** Ĝi estas multspeca kaj portas diversajn konsekvencojn. Ĝi estas nek nova, nek neatendita, kaj nun ĝi atingis la pinton de sia efiko. Ĉi jare definitive finiĝas la epoko de presitaj Esperanto-gazetoj en Kroatio en la ĝisnuna senco, kun malgrandaj perspektivoj rapide kaj baldaŭ ŝanĝi tion. *Tempo*, la oficiala gazeto de Kroata Esperanto-Ligo (KEL), kiu ekaperis en 1980, per sia 130-a numero ĉesis aperi kiel papera gazeto. Financita de la kroata Ministerio pri kulturo, kiu en 2017 decidis ne plu subteni ĝian paperan version, *Tempo* plue aperados nur kiel sona kaj reta gazeto. La gazeto *Zagreba Esperantisto*, kiu estis eldonata de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), perdis sian financan bazon post la forpaso de sia ĉefa subtenanto Radenko Milošević (1943-2016), pro kio ankaŭ ĝi ĉesis aperi.

Vole aŭ nevole ni devas komenci eldonadi retajn gazetojn. Ni deziras informiĝi kaj informi aliajn, kaj reta periodaĵo certe helpas al ni en tiuj klopodoj.

UZE komencas eldonadi retan informilon *Kresko*, kiu promocios la ideojn de la komuna agadplatformo, nomata **KRoata ESperantista KOlegaro**. Ni planas eldonadi ĝin monate kaj publikigi artikolojn pri agado de **ĉiuj organizaĵoj kaj individuoj**, donante al ili ŝancojn por diskonigo de iliaj atingoj kaj sukcesoj. La legantoj povas plenrajte kaj libere distribuadi ĝin, kaj aliaj redakcioj rajtas represadi la artikolojn kaj plue diskonigi la informojn ĉi tie legitajn. *Kresko* plue agados sur la principoj de libera tribuno, kie oni esprimu diversajn opiniojn, sed bone argumentitajn kaj pruveblajn, kio ekskludas ĉiaspecajn ofendojn, publikajn malhonorigojn kaj personajn atakojn, kies nura celo estas forigi kaj maljuste malhonorigi tiujn homojn, kiuj havas malsamajn opiniojn.

Estas permesata ankaŭ senlima printado de paperaj ekzempleroj por propra uzado kaj distribuado al homoj, kiuj ne povas aŭ ne volas legi la retan eldonon.

La redakcio

KIO ESTAS KRESKO?

KRESKO estas mallongigo por **KRoata ESperantista KOlegaro**.

KRESKO ne estas nova organizaĵo, sed komuna agadplatformo, celanta harmoniigi la agadon de kroataj esperantistoj, senkonsidere ĉu ili apartenas al iu Esperanto-organizaĵo aŭ aktivas individue.

KRESKO-n ankoraŭ en 2013 kune planis Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) kaj Dokumenta Esperanto-Centro (DEC).

KRESKO ne postulas vian aliĝon, nek kotizon, sed volonte akceptos vian kunagadon tie, kie vi volas montri vian kapablon, aŭ trovas vian intereson.

KRESKO celas plioftigi kaj plinombri renkontiĝojn de kroataj esperantistoj, motivigi la enlandan esperantistaron por partopreni, kolegece informi, kune plani kaj kunordigi sian agadon, eviti negativan konkurencon, sed stimuli pozitivan kunlaboron kaj trovi komunajn interesojn, subteni aktivecojn de aliaj per partopreno, kunorganizado kaj kunfinancado, evoluigi demokratian diskutadon en kultura dialogo, forigi miskomprenojn, ofendojn kaj kverelojn, estimi la laboron de la aliaj kaj ĝoji pri ĉies sukceso, kiun oni diskonigu kaj premii.

Se viaj celoj kongruas kun la celoj de **KRESKO**, vi estas bonvena en nian rondon!

CITAĴO: Anto Mlinar, prezidanto de KEL

Antaŭ kvar jaroj kulminis la krizo en nia Landa Asocio. Necese estas konstati ke ĝin kaŭzis multaj faktoroj kiujn oni povus multaspekte kaj diversmaniere analizi kaj interpreti, sed tion nun mi ne intencas fari. Mi deziras nur diri ke tio estis signalo ke necesas esence ŝanĝi la manieron de interhomaj rilatoj kiuj laŭ mia opinio estis unu el la plej gravaj kaŭzoj de la krizo.

Citaĵo el: *Aktualaĵoj pri la E-movado en Kroatio* (en: *Tempo*, n-ro 130)



LA PLEJ GRANDA ARANĜO DE LA JARO 2017

La internacia festivalo de Esperanto-kulturo **INTER-FEST**, okazinta en Bjelovar inter la 5-a kaj 12-a de aŭgusto 2017, ofertis kelkajn programojn al bjelovaranoj eĉ kvin tagojn pli poste. La festivalon organizis **Bjelovara Esperantista Societo** kunlabore kun tri aliaj kroataj Esperanto-societoj, kaj partoprenis ĝin 140 festivalanoj el 16 landoj. La aŭspicio de la festivalo akceptis Urbo Bjelovar kaj Departemento Bjelovar-Bilogora. Ĝi estis parto de *Bjelovara kultura somero*.

La publiko estis agrable surprizita per la abundeco kaj diverseco de la programoj, kiujn la festivalo ofertis al la partoprenantoj kaj civitanoj de Bjelovar. El la muzika programo certe menciindas la nacia vespero *Bjelovar per koro kantas*, en kiu partoprenis 120 dancantoj kaj kantantoj el kelkaj kultur-artaj societoj. Ne malpli interesaj estis la aliaj muzikaj programoj: koncerto de religiaj kantoj, plenumita de operkantisto **Neven Mrzlečki** el Zagrebo en la Katedralo de sankta Teresa de Ávila, koncerto de eksterlandaj muzikistoj en la urba parko kaj kelkaj Esperantaj koncertoj.

Dum la Festivalo estis prezentita eĉ deko da novaj libroj, el kiuj la *Oklingva medicina enciklopedia vortaro* de **Jozo Marević** el Velika Gorica kaj *Elektitaj tekstoj pri Internacia*

juro de **Ivo Lapenna** estas sciencaj eldonaĵoj, kaj en la beletra kampo certe la plej grava estas la Esperanta eldono de la romano *La nigra patrino tero* de **Kristian Novak**. Krom tiuj libroj estis prezentitaj eldonaĵoj de aŭtoroj el Israelo, Bulgario, Rumanio kaj Pollando.

Pri la festivala temo *Kultura kunfandiĝo de la multetna Eŭropo* oni diskutis en la speciala ronda tablo, en kiu partoprenis reprezentantoj de Pollando, Bulgario kaj Kroatio.

Aparte riĉa programo okazis en la Urbamuzeo de Bjelovar, kie al la publiko estis proponitaj eĉ tri eksterordinaraj ekspozicioj. La unua el ili, *Mia unua alfabetlibro*, en kiu prezentiĝis 120 lernolibroj el 42 landoj, al la vizitantoj konigis la lingvan riĉeco de la mondo kaj atentigis pri ĉiutaga malaperado de malgrandaj lingvoj. La ekspozicio de infandeseĝnaĵoj *La flugiloj de fantazio* okazis kiel kompletigo al la statuso de Bjelovar, kiu estas urbo amika al infanoj. Ĝi prezentis tricenton da infanverkoj en tri aĝkategorioj, dum por la ekspozicio titolita *Azia paletro* el Koreujo venis pentristo **Ho Song**, kiu por bjelovaranoj preparis ankaŭ aron da aliaj interesaj programoj, interalie laborejojn de portretado kaj korea skribo.

La festivalo komenciĝis per amikumado en la Hotelo *Central* dum la Interkona

vespero, kies gasto estis ankaŭ la novelektita urbestro de Bjelovar, s-ro **Dario Hrebak**, kiu al la organizantoj kaj partoprenantoj esprimis bonvenigajn vortojn. La oficiala malfermo okazis la 6-an de aŭgusto en la Kulturdomo, kie la ĉestintoj omaĝis kaj rememoris pri 140.000 viktimoj de la japana urbo Hiroŝimo, kiu precize je tiu dato antaŭ 72 jaroj estis trafita de atombombo.

En la *Kultura kaj multimedia centro* okazis projekcio de filmo *Esperanto* de franca reĝisoro **Dominique Gautier**, kaj specialan atenton akiris Sankta meso en Esperanto, okazinta kun permeso de Lia ekscelenco, **Vjekoslav Huzjak**, episkopo de la Diocezo Bjelovar-Križevci, kiun en la plenplena Katedralo de sankta Teresa de Ávila celebris **Rikard Patafta**.

En la programo de **INTER-FEST** okazis ankaŭ la 5-a deklamkonkurso, kiun Bjelovar tradicie gastigas. La eksterlandaj esperantistoj havis la okazon lerni la kroatan en la laborejo gvidita de prof. **Marija Jerković** el Zagrebo, kaj la poŝtofiĉejo en Bjelovar la 7-an de aŭgusto uzis specialan stampon kaj estis eldonita filatela koverto.

Dum la tuttaga pikniko en Veliki Grđevac la festivalanoj rememoris pri la infanverkisto Mato Lovrak, vizitinte la *Kulturcentron Mato Lovrak* kaj la memor-ĉambron en la loka elementa lernejo, post kio oni ĝuis la naĝadon en la lokaj naĝbasenoj.

La festivala semajno estis uzita ankaŭ por ekskursi al Zagrebo, Stubica, Kumrovec, Varaždin kaj Trakošćan, kaj pri la festivalaj programoj raportis ĉiutaga presita *Festivala folio*.

Post la festivalo estis dirite, ke similaj eventoj mankas en la kontinenta parto de Kroatio, do la organizantoj esperas, ke malfermiĝis la ebleco ripeti la bonajn spertojn de la ĉi-jara aranĝo.

Pri **INTER-FEST** eksterordinare abunde raportis ĉiuj presitaj kaj elektronikaj informiloj, ne nur en la urbo kaj regiono, sed naciskale. La Festivalo estis la plej granda Esperanto-evento en Kroatio kaj tre bona reklamilo por Esperanto en la jubilea jaro de la 130-a datreveno de Esperanto kaj 100-a morto-datreveno de L. L. Zamenhof.

EKSPOZICIO EN SLOBOŠTINA

En la biblioteko de la zagreba kvartalo Soboština, funkcia en la strato *Karel Zahradnik 8*, vi povas vidi ekspozicion *Esperanto, la lingvo por la 21-a jarcento*, malfermitan la 1-an de decembro kaj viziteblan ĝis la 2-a de januaro 2018.

La ekspozicio celas atentigi kaj informi pri la 130-jara historio de Esperanto kaj pri la jubileoj, kiuj estas festataj ĉi-jare. Aliflanke ĝi celas instigi homojn lerni Esperanton en iu el la planataj kursoj.

La ekspozicion iniciatis arkitektino **Diana Petrović Volarević**, nova membro de Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE). Helpe de la prezidantino de UPE **Marija Jerković** ŝi aranĝis la ekspozician montrofenestron, en kiu estas prezentitaj diversaj presitaj materialoj havigitaj de Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac, aparte la aktuale eldonitaj libroj, ekz. *La nigra patrino tero* de Kristian Novak. La ekspozicion kompletigas grandformata afiŝo kun bazaj informoj pri Esperanto.

Al la gvidantino de la biblioteko, s-ino **Dunja Sorokin**, diplomita bibliotekistino, la organizantoj donacis lernolibrojn *Esperanto - izravna metoda* de Stano Marček.

Pri la ekspozicio raportis Radio Sljeme, kies ĵurnalistino faris porokazan intervjuon kun **Marija Jerković**.



MIA UNUA ALFABETLIBRO EN LA KROATA LERNEJA MUZEO



Unu el la plej gravaj klerigaj institucioj de Kroatio, *Kroata Lerneja Muzeo* (Hrvatski školski muzej), situanta en Trg Republike Hrvatske 4 en Zagrebo, akceptis la proponon de **Marija Jerković**, prezenti en sia ejo la vojaĝantan ekspozicion *Mia unua alfabetlibro*, kiu prezentas 120 lernolibrojn el 42 landoj, kolektitaj per helpo de diverslandaj esperantistoj. Tiu kolekto de alfabetlibroj estas posedata de Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) en Đurđevac, kaj la unuan fojon ĝi estis publike prezentita dum INTER-FEST en la Ŝtata muzeo de Bjelovar. DEC kaj Kroata Lerneja Muzeo estis kunorganizantoj de la ekspozicio, kiu viziteblis en la Muzeo inter la 7-a kaj 17-a de decembro.

La oficiala malfermo okazis la 7-an de decembro je la 18h00. La programon de la malfermo gvidis s-ino **Marijana Bračić**, estrino de la merkato de la Muzeo. Dum la malfermo enkonduke parolis la direktorino de la Muzeo, s-ino **Štefka Batinić**, kaj nome de la zagreba urbestro **Milan Bandić**, la vizitantojn salutis kaj bonvenigis s-ino **Katarina Milković**, helpantino de la estro de Ŝtata oficejo pri edukado, klerigo kaj sporto. Pri la ekspoziciita kolekto parolis ankaŭ **Josip Pleadin** nome de DEC. La ekspozicio estis bone reklamita kaj la 7-an de decembro pri ĝi raportis eĉ la vespera tagjurnalo *Dnevnik* de la unua programo de Kroata televido.

BONAN MATENON, KROATIO!

Iniciate de **Diana Petrović Volarević** realiĝis gastado de **Marija Jerković** kaj **Josip Pleadin** en la tre populara mozaika elsendo de la Kroata televido *Bonan matenon, Kroatio* dediĉita al Zamenhofa tago. La programero titolita *Meĉunarodni dan esperanta* (La internacia tago de Esperanto) estis elsendita la 11-an de decembro 2017 je la 8h15 kaj daŭris 8 minutojn.

En la elsendo oni pritraktis la temojn de la 130-a datreveno de Esperanto, la 100-an naskiĝdatreveno de L. L. Zamenhof kaj diversajn aktivecojn de kroataj esperantistoj, speciale la programojn, kiuj estis planitaj por la lasta ĉi-jara monato.

Mallonge oni prezentis la literaturan agadon, la plej aktualajn tradukitajn kroatajn librojn (*La nigra patrino tero*, *La kapreolido Pirgo* kaj *La trajno en la neĝo*).

Se vi ne sukcesis spekti la menciitan programon, vi povas vidi ĝin en la retejo de Kroata Esperanto-Ligo (www.esperanto.hr) aŭ en jutubo, kien alŝutis ĝin Sanja Forjan Pleskina: <https://www.youtube.com/watch?v=E-lSqdHBIVY>. Ankaŭ DEC (dec.kroatio@gmail.com) laŭpete povas sendi al vi la 20-megabajtan dosieron.



ESPERANTO EN LA URBA BIBLIOTEKO DE PETRINJA

La urba biblioteko kaj legejo de Petrinja, kunlabore kun Esperanto-societoj de Sisak kaj Petrinja, la 15-an de decembro, okaze de Zamenhofa tago, organizis specialan programon *La 130-a datreveno de la Internacia Lingvo Esperanto*. En la preparoj de la programo partoprenis **Nataša Dorosulić** kaj **Sreĉko Radulović**, kaj en la programo gastis **Jozo Marević** el Velika Gorica kun la prezento de sia *Oklingva medicina enciklopedia vortaro*, **Marija Jerković** el Zagrebo kun la prelego *La Zamenhofa jaro*, **Nataša Dorosulić**, kiu prezentis la Esperantan eldonon de la libro *La tilia urbo* de Marija Horžinek kaj **Josip Pleadin** el Đurđevac,

prelegante pri *Esperanto – ĉu projekto aŭ vivanta lingvo*. Raporton pri la aranĝo vi povas legi ĉe: <http://portal53.hr/obiljezana-130-obljetnica-medunarodnog-jezika-esperanta/>

GRADSKA
KNJIŽNICA I
ČITAONICA
PETRINJA





UZE FINANCE KONTRIBUIS AL INTER-FEST

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), kiu estis kunorganizanto de la kultura Esperanto-festivalo INTER-FEST, okazinta aŭguste en Bjelovar, kontribuis al la festivala kaso per donaco de 2.000 kunaĵoj.




JARA PREMIO DE KEL ATRIBUITA AL DEB

Dum la 11-a kunsido de la Estraro de Kroata Esperanto-Ligo (KEL), okazinta la 16-an de septembro 2017, estis establita **Jara premio** en valoro de 1.000 kunaĵoj. La Estraro de KEL decidis tiun premion en la jaro 2017 atribui al Bjelovara Esperantista Societo kun speciala akcento je organizado de la festivalo INTER-FEST.



OSIEK-PREMIO 2017

OSIEK-premio estas premio por faka aŭ traduka laboro en la lingvo Esperanto. La premio estas aljuĝata ĉiujare ekde 1990 al vivanta esperantisto pro kultura kreaĵo, precipe nefikcia, por kiu balotis plej multaj OSIEK-anoj. Inter la kvin plej ofte proponataj fine decidis partoprenantoj de Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK, kiu okazas ĉiujare antaŭ Universala Kongreso. En 2017 la premio estis aljuĝita al **Josip Pleadin** pro la verko *Ordeno de Verda Plumo*. Pri la premio oni decidis la 17-an de julio 2017 dum la OSIEK-konferenco en Banská Štiavnica (Slovakio). Pleadin estas la tria kroato al kiu estas aljuĝita ĉi tiu premio. En 2002 la ricevinto estis **Krešimir Barković** por sia traduko de *7000 tagoj en Siberio*,



kaj en 2009 **Spomenka Štimec** por *Kroata milita noktlibro*. La nuna valoro de la Premio estas 700 eŭroj.

DEK JAROJ DE UZE KAJ UPE

La 10-jaran jubileon modeste festis Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) kaj Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE), ambaŭ fonditaj en 2007. La festeto okazis en la komune uzata societejo en *Radnički dol 1* la 16-an de decembro 2017 je la 10h00. En siaj paroladoj la prezidantoj de ambaŭ societoj resumis la 10-jaran agadon kaj rememorigis pri la sukcesoj kaj malsukcesoj de tiu jardeko. Aparte oni rememoris pri Radenko Milošević, kiu bedaŭrinde forpasis en aŭgusto 2016, sen kiu multaj el tiuj sukcesoj ne povintus okazi.



LINGVO KAJ ANTAŬJUĜOJ

Lingvo kaj antaŭjuĝoj estas speciala elsendo de la unua programo de la Kroata Radio, en kiu oni pritraktas prilingvajn temojn. En tiu duonhora elsendo la 19-an de decembro je la 13h30 la ĉefa temo estis la ekspozicio *Mia unua alfabetlibro*, okazinta en Kroata Lerneja Muzeo en Zagrebo.

La ĵurnalistino **Anita Anić** preparis longan kaj interesan materialon. Ĝiaj gastoj estis la direktorino de Kroata Lerneja Muzeo **Štefka Batinić**, kiu parolis pri la unua



kroata glagolica alfabetlibro, eldonita en 1527 en Venecio, kaj **Josip Pleadin**, la aŭtoro de la ekspozicio *Mia unua alfabetlibro*, prezentita en la Kroata Lerneja Muzeo, kiu parolis pri la ekspozicio mem kaj pri diversaj aspektoj de la lingva situacio en la mondo.



60 JAROJ DE SEK EN ZAGREBO

Studenta Esperanto-Klubo (SEK) el Zagrebo festis sian 60-an jariĝon la 16-an de decembro 2017. La festo okazis kadre de Zamenhof-tago, kiun

organizis Kroata Esperanto-Ligo en *Europa domo* (Eŭropa domo) en Zagrebo. Tiu granda jubileo estis bona okazo por kunvenigi esperantistojn, inter kiuj multaj estis membroj de SEK. Krome, la 60-jariĝo de SEK koincidis kun la 130-a datreveno de Esperanto kaj 100-an morto-datreveno de Lazaro Ludoviko Zamenhof. Ĝuste tial la plej grandan parton de la programo konsistigis la kvizo pri la historioj de SEK, la Esperanta movado en Kroatio kaj Zamenhof. La kvizon gvidis **Đivo Pulitika** kaj partoprenis ĝin 11 konkurantoj, el kiuj la unuan premion gajnis **Faruk Islamović**, la duan **Davor Klobučar** kaj la trian **Anto Mlinar**. Pri la historio de SEK parolis ankaŭ **Ankica Jagnji**, kiu estis prezidantino en la jaro 1984. Ŝi diris, ke SEK vere estis grava parto de ŝia vivo. **Robert Milijaš** revenigis nin en la nuntempon per

prezentado de nova repaĝo de SEK, kiun li prizorgas. Samtempe li prezentis la agadon de SEK en la jaro 2017. En la muzika parto ĉarmigis nin **Andrea Horvat** kaj **Robert Milijaš**, kun kiuj la publiko volonte kunkantis, precipe bone konatajn kantojn. Ni devas mencii ankaŭ la aliajn SEK-anojn, kiuj preparis la programon kaj nuntempe estas anoj de la kluba estraro: sekretariino **Lucija Biličić**, vicprezidanto **Filip Mikuličić** kaj prezidantino **Mihaela Cik**, kiu estis moderato de la tuta programo. La programo finiĝis per komuna fotado de la iamaj geprezidantoj de SEK, kiuj venis al la festo. Post la programo ni ĝuis tre bongustan torton, sur kiu klare videblis la cifero 60. Kun bonaj deziroj ni daŭrigos la riĉan historion de SEK, kiu komenciĝis en la jaro 1957.

Mihaela Cik

Fotoj: 1) En *Eŭropa domo* kolektiĝis iamaj kaj nunaj SEK-anoj kaj iliaj gastoj por festi la 60-an jubileon de sia klubo, **2)** Inter la ĉeestintoj estis ankaŭ iamaj klubaj prezidantoj, **3)** La aktuala prezidantino Mihaela Cik tranĉas la jubilean torton.

(Fotis: Lucija Biličić)



Retpaĝo de Studenta Esperanto-Klubo Zagrebo: www.sek.hr

POR DECA HEJMO DE DEC – DOKUMENTA ESPERANTO-CENTRO!

Eble aŭstraliaj esperantistoj neniam havus la nunan Esperanto-domon en la sidneja kvartano Redferno, se antaŭ 90 jaroj Aŭstralion ne estus enmigrinta kroata esperantisto **Ivan Matašin** (tiulande konata kiel **John Matasin**), kiu estis idea gvidanto de ĝia aĉeto.

Eble kroataj esperantistoj neniam havus sidejon por sia Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) en Ĝurđevac, se ne ekzistus **Herolt Rheyd Mountbatten** el Aŭstralio, kiu ĉi-jare donacis la iniciatan sumon de 6.000 eŭroj, kaj tiel startigis la projekton, pri kiu oni revas jam kelkajn jarojn.

Dokumenta Esperanto-Centro estas nacia Esperanto-biblioteko kaj arkivo, kiu sisteme okupiĝas pri kolektado, konservado kaj esplorado de ĉiaspecaj materialoj pri Esperanto. Sed ne nur! DEC estas la plej aktiva regiona kaj ne malpli aktiva tutlanda disvastiganto de Esperanto, ĉefe en la nordokcidenta parto de la lando, kie la Internacia Lingvo havas siajn fortajn radikojn ekde 1909. Temas pri la sama regiono el kiu al Aŭstralio elmigris **John Matasin**. DEC estas ankaŭ organizanto de tre sukcesaj programoj kaj aranĝoj kaj renoma Esperanto-eldonejo.

En septembro kaj oktobro ĉi-jare, dank' al la donaco de **H.R. Mountbatten**, okazis la unuaj renovigaj laboroj, kiuj celas rekonstrui malnovan domon kaj tiel havigi por DEC ĉirkaŭ 150



DEC estas kompleksa arkiva kolekto, parton de kies biblioteko, konsistanta el pli ol 6.000 libroj vi vidas sur la ĉi-supra foto!

kvadratmetrojn da spaco. Tie lokiĝos la biblioteko kaj arkivo, oficejo, salono por prelegoj kaj dek litoj, disponeblaj por tranokto al esplorantoj, vizitantoj kaj vojaĝantaj esperantistoj. En la nova sidejo okazos ankaŭ kunvenoj de la membraro de DEC kaj estos organizataj diversaj Esperantaj aranĝoj.

La konstrulaborojn oni daŭrigos printempe de 2018, ĝis kiam estas necese kolekti ĉirkaŭ 11.000 eŭrojn. Granda sumo por kroataj esperantistoj, sed kolektelebla kun helpo de donacemaj samideanoj ĉiulandaj, similaj al s-ro Mountbatten.

DEC kun siaj multaj aktivecoj estas parto de la infrastrukturo, nepre bezonata al la Esperanto-movado por senĝena funkciado. Tial la estraro de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) decidis helpi la projekton *Por deca hejmo de DEC*, per lanĉo de BRIKO-kuponoj, per kies aĉeto ĉiu povas simbole partopreni la rekonstruadon de la sidejo de DEC. Pli detale pri la kampanjo legu sur la paĝo 8 de ĉi tiu numero de *Kresko*. UZE per vendado de BRIKO-kuponoj klopodos kolekti minimume 20% de la sumo por renovigaj laboroj, bezonata en 2018, respektive 2.200 eŭrojn.

MODERNAJ VERKISTOJ EN ESPERANTO

Al Esperanto oni riproĉas mankon de modernaj literaturaj verkoj. Kroataj esperantistoj klopodos ŝanĝi tiun situacion. En 2017 Dokumenta Esperanto-Centro eldonis la furoran romanon de **Kristian Novak** *La nigra patrino tero* (Ĉrna mati zemla), kiun tradukis **Josip Pleadin**, kaj Kroata Esperantista Unuiĝo (KEU) la romanon *Sovaĝa ĉevalo* (Divlji konj) de **Božidar Prosenjak**, en la traduko de **Zora Heide**. Polo **Tomasz Chmielik** tradukis la romanon *Ruta Tannenbaum* de **Miljenko Jergović** kaj *La bankedo en Blitvo* de **Miroslav Krleža**. Lastatempe ankaŭ Bjelovara Esperantista Societo ricevis permeson de **Goran Tribuson** traduki iun el liaj multaj romanoj.



Prezo: 18 eŭroj (135 kunaŝoj) • Mendu ĉe: dec.kroatio@gmail.com

AĈETU VIAN BRIKON KAJ KONSTRUU KUN NI!

Bankkonto de UZE:

Udruga zagrebačkih esperantista

HR7923400091110321529, BIC/SWIFT-kodo: PBZGHR2X



MONKOLEKTA KAMPANJO: POR DECA HEJMO DE DEC!

Radenko Milošević, la unua prezidanto de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, kiu estis granda mecenato de Esperanto en Kroatio, dum jardekoj instigadis fondon de nacia Esperanto-biblioteko kaj arkivo. Kiam tiu ideo komencis realiĝi per fondo de Dokumenta Esperanto-Centro (DEC) en 2010, li estis ĝia malavara subtenanto. Nelonge antaŭ sia forpaso, li planis regule financadi la renovigajn laborojn en la DEC-sidejo ekde 2017, kompreninte, ke la grandega kaj ĉiam kreskanta kolekto, notita en la listo de UEA kaj bezonanta ŝtatan protekton, ne povas ĉiam funkcii en privata domo. Bedaŭrinde, li forpasis ne povante realigi tiun lastan ideon, kvankam evidentas la spuroj de pluraj liaj antaŭaj financaj intervenoj por la bonfarto de DEC.

Unu el liaj ideoj estis lanĉo de BRIKO-kuponoj, per kiuj bonvolemaj esperantistoj kunfinancus la konstruadon de DEC-sidejo. Tiu lia ideo nun fariĝis pli aktuala ol iam antaŭe, ĉar la laboroj, kiujn li planis financi en 2017, jam komenciĝis per la financa helpo de aŭstraliano **Herolt Rheyd Mountbatten**. UZE siaflanke klopodos instigi siajn membrojn, amikojn kaj diverslandajn esperantistojn kaj E-organizaĵojn aliĝi al tiu ideo kaj helpi finance la kampanjon **Por deca hejmo de DEC!** La originala ideo de la komuna agadplatformo KRESKO estas diversmaniere helpadi la projektojn de aliaj esperantistoj kaj Esperanto-organizaĵoj. Do estas tute nature, ke UZE subtenu la projekton de sia partnera organizaĵo DEC. Laŭplane oni devus kolekti **11.000 eŭrojn** por la laboroj

religotaj en 2018. El tiu sumo UZE klopodos kolekti minimume 20%, respektive **2.200 eŭrojn**.

Por kolekti tiun sumon, ekde la 25-a de decembro 2017 UZE lanĉas specialajn **BRIKO-kuponojn**. Ĉiu briko valoras 1 eŭron, respektive 7,50 kunaĵojn, kaj ili estas lanĉitaj en valoro de 1-, 5- kaj 10-brikaj slipoj. Ĉiuj kuponoj estas prese numerigitaj.

La 25-an de decembro 2017 UZE lanĉas la jenajn kuponseriojn: **200 kuponojn de 1 briko:** numeroj 2801-2900 kaj 4201-4300, **200 kuponojn de 5 brikoj:** numeroj 0001-0100 kaj 0601-0700 kaj **100 kuponojn de 10 brikoj:** numeroj 1601-1700. La suma valoro de ĉiuj lanĉitaj kuponoj estas 2.200 eŭroj, respektive 16.500 kunaĵoj.

La kuponoj estas aĉeteblaj per pago de difinita sumo al bankkonto de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (Udruga zagrebačkih esperantista): **HR7923400091110321529, BIC/SWIFT-kodo: PBZGHR2X** aŭ al konto de UZE ĉe Universala Esperanto-Asocio: **uzes-y**, ambaŭkaze menciante ke temas pri **BRIKO-kuponoj**. La kuponojn oni povas aĉeti ankaŭ ĉe la kasisto de UZE dum la societaj kunvenoj en la societejo *Radnički dol 1* en Zagrebo.

La aĉetantoj de BRIKO-kuponoj povas konservi la kuponojn kiel pruvon de sia donaco, aŭ uzi ilin por pagado de diversaj servoj kaj varoj, ofertataj de DEC. Pagadi servojn kaj varojn per la aĉetitaj kuponoj oni povos komenci unu jaron post la aĉeto, kaj la neuzitaj kuponoj eksvalidiĝos kvar jarojn post la aĉeto.



KRESKO monata informilo

Eldonas:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE),
Jarunska 6, 10000 Zagreb

Retadreso de la redakcio:
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redaktas: Josip Pleadin

Kresko aperas en la lasta tagdeko de ĉiu monato.

**Kresko estas libere distribuebla,
kopiesbla kaj citebla.**